*Freneza Revuo Esperantista Ŝatanta Observi*

N-ro 12/(55)

# FREŜO

**La novembro 2017j**

*La retrevuo estos senpaga nur por ĉiuj kiuj volas ricevi ĝin*

Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin :-)

**Listopad 2017 r.**



Se vi volus elŝuti antaŭajn numerojn de **"FREŜO"**
jen la ligilo al la magazeno de e-magazinoj:
(enskribu ĝin en retumilo - **NE KOPIU!**):

**https://goo.gl/xh1U1D**



---------------------------

*Se vi havus proponojn, materialojn por la venonta numero de ĉi revueto - skribu al mi:*

**fresxo@protonmail.com**
Skajpo: **marianzdankowski**

**Kunlaborantoj:**

*Henryk WOWER*
*Eduardo KOZYRA*
*Franciszek WITUCKI*
*Andrzej GIELERT*
*Mirka KUBICKA*

Recenzoj:
pri "**FREŜO**" ĉiam atendataj
*Mi petas kritiki -*
*speciale pro gramatikaj eraroj :-)*

*Se vi volus, ke ĉi-tiun belegan revueton ricevadu viaj geamikoj - sendu al mi iliajn ret-adresojn:*

**fresxo@gmail.com**
**fresxo@protonmail.com**


*Ĉefredaktoro:*
**Marian ZDANKOWSKI**
*poŝtel. +48 622 115 650; +48 (0) 604-079-141*

*Adreso: str. Limanowskiego 36 m 3,*
*10-343 OLSZTYN, POLLANDO*
*retadreso:* fresxo@protonmail.com
*Skajpo:* **marianzdankowski**


*Se vi volus instigi min ne nur pervorte (perforte):*

Bankokonto:
(IBAN) n-ro: PL 54114020040000380246602778
Ricevonto: Marian ZDANKOWSKI
Ricevontadreso:10-343 Olsztyn; Limanowskiego 36/3
BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK
Bankadreso: BRE Bank S.A. INTERNET BANKING,
al. Pilsudskiego 3, 90-368 Lódz
SORT CODE: 11402004
Konto ĉe UEA: mzda-e













*Frivola Revuo Efemera kun Ŝokantaj Obscenaĵoj*
**N-ro 5 (48)**

# FREŜO

**La aprilo 2017j**
La retrevuo estos senpaga kiel tipaj retrevuoj
Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin
**Kwiecien 2017**



*Gramatikon mi ne konas kaj gazetojn ne abonas...*
*"ESTAS MI ESPERANTISTO" - Julio Baghy*

## *Jen diras la Ĉefredaktoro :*

**Nova numero...**
**Novaj proponoj...**

**Ekzemple:**

**- divenu kiel nomiĝas la firmao kiu posedas prezentitajn emblemojn (solvo sur la lasta paĝo):**
**- ege naiva fabeleto titolita "La Ateisto" verkita de brazila fabel-aŭtorino Rachel de Quieroz**
**- filozofia prelego ("Kaciko kaj Juĝo") pri moderna tridivido de potenco prezentita de Janusz Korwin-Mikke el Pollando**
**- ĉiunumera novelo sub la titolo "Bukaj-aj Esperantistaj Frenezetuloj" verkita de Barry Friedman**
**- kaj kiel kutime multe da: Esperantaĵoj, bildoj (satiraj bildoj), anekdotoj, kaj komentoj por ĉi aktuala temo;**

**Via Ĉefredaktoto**
**Marian ZDANKOWSKI**

# LEGANTAJ REAGOJ

Saluton kara Maria,

La numeron de Fresxo kiun, vi kopiis al mi, mi ne vidis. Cxu vi povas resendi ?

Amike,
Alphonse **WASEKA KAMANGO** el
Goma/RDK (Kongo (Kinŝasa)
www.bonvolo.net

Ĉu fresxe? Jes! ; ... Ĉu brile? Jes ja!

EstimatajMarian k skipo!

Permesu, ke mi aldonu, mirinde

Dankas vin ĉiuj
**GOLDBERG Ken**. (Keneĉjo)
Los-Anĝeleso - USONO

Kara samideano:

Salutinte elkore, MI jam vidis vian karan revuon (Fresxo) en unu el kanaloj de (Telegramo)!foluminte ghin, mi interesigis pri ghi!

Tial mi petas vin,bonvolu sendi vian revuon al mi chiumonate!Antaue mi tre dankas vin.

Samideano Via:
**Kambiz Khamjani.**


*Saluton mia kara,*

*Kiel vi fartas ? kaj kio nova cxe vi en Polando ? Mi de longe havis ptoblemojn pri komputilo kaj reto. Nun mi jam solvis tiun cxi problemon. Mi cxiam logxas en Hispanio sed nun en San Sebastien (Donostio) apud cxe landlimo kun Francio. Mi laboras en hotelo kiel kelnero. Mi gxojos legi viajn novajxojn.*

*Fartu bone kaj gxis!!!!!!!!*

*LANGOUME Abraham*


# Fo - V I V O
















# POLITIKA VIVO

La civitanoj de Kartvelio ricevis rajton eniri Eŭropan Union sen vizojn. Loĝantoj de republikoj: Suda Osetio kaj Abĥazio povos profiti tiun privilegion, kondiĉe ke ili havos la kartvelian pasporton.

La fama teroristo Ilich Ramirez Sachez konata sub pseŭdonomo „Ŝakalo” ricevis laŭvican, la trian verdikton, kondamnata lin al ĝismorta malliberigo. Tio estis puno pro sanga atenco en Parizo en 1974, kaŭzanta morton de du personoj kaj vundanta 34. „Ŝakalo” opinias sin senkulpa.

La aŭstra ministro pri eksterlandaj aferoj nomis la malpermeson, enkondukita en la lando, vesti burĥojn kaj ĝenerale vestojn kaŝantajn vizaĝojn en la publikaj lokoj, leciono pri „estimo de demokratia socio”. Planata estas ankaŭ malpermeso de disdonado de Korano kaj specialaj kursoj pri aŭstraj valoroj.

Farado de memfoto (selfie?) mortigas en la mondo pli da homoj ol balenoj. Spertis tion du meksikaninoj, kiuj faris por si foton sur la plato de flughaveno. Post momento mortigis ilin alteriĝanta aviadilo.

Kia estas probableco, ke ies vivo finiĝos en la stomako de granda serpento? Ŝajnis, ke nula. Tamen tion spertis iu juna indoneziano, kiu perdiĝis dum la vojo al laborejo. Serĉantaj lin policistoj renkontis strange dikan sepmetran pitonon. Bedaŭrinde plej malbona suspekto evidentiĝis vera.

**DU ŜTATOJ**
**DU LEĜSISTEMOJ**
**UNU METROPLO**

1. „La urboj El Paso (Teksaso) kaj Ciudad Juarez (Meksiko) kreas unu metropolon, dividitan per la limo meksika-usona. En Teksaso ĉiu homo neniam punita pro perforto povas laŭleĝe aĉeti pafilon/armilon kaj municion, kaj ĉiu ilin havas – averaĝe 2,5 por la viro.

2. En Meksiko laŭleĝe estas deviga malpermeso posedi iun ajn armilon, kaj estas antaŭvidataj grandegaj punoj pro malobservo de tiu leĝo. Antaŭ kelkaj jaroj registaro distretis/disveturis sep milojn da armiloj kaj de tiu pulpo faris reklampanelon kun la surskribo „NE, POR ARMILO”. Eĉ por la posedo de poŝtranĉilo minacas kvinjara maliberigo. Rezulto? En 2010 en la urbo Juarez estis pli ol 3600 murdojn. En El Paso … 5!

Usono – libera posedo/atingo de armilo
Meksiko – malpermeso posedi armilo

# PROFESIOJ EN ESPERANTO


Instruistino.


Kuracisto.


Flegistino.


Kudristino.


Kelnero.


Kuiristino.


Artistino.


Studento.


Sekretariino.


Agrikulturisto.


Ĝardenisto.


Floristino.


Leterportisto.


Purigistino.


Fajrestingisto.


Buĉisto.


Kombistino.


Razisto.


Taksiisto.


Policisto.


Futballudisto.


Kasistino.


Fotisto.


Mekanikisto.

# ANEKDOTA VIVO

## La Kato ne Scias...

En mensmalsanulejo viro, kiu kredis, ke li estas muso plibo-niĝis kaj elskribiĝis. Sed li restis sidanta apud la pordo kaj ne volis eliri. Lia kuracisto demandis la kialon.
Paciento: ***Ĉar tie troviĝas kato.***
Kuracisto: ***Tamen vi scias, ke vi ne plu estas muso.***
Paciento: ***Jes, sed la kato eble ne scias tion.***

## Edzina Pledo

Sinjorino plendas al amikino pri sia edzo:
***- Li estas tia. Dum la tuta jaro li vojaĝadas, nur dum unu monato li estas hejme.***
***- Tio devas esti tre teda vivo por vi, ĉu ne?***
***- Nu ja, tiu monato tamen rapide pasas...***

## La Pastro

Sinjorino malsaniĝis kaj ne povas iri al la diservo en la dimanĉo. Tial ŝi sendas tien sian edzon. Kiam li revenas, ŝi pridemandas lin:
***- Nu, ĉu vi estis je la diservo?***
***- Jes, respondas la sinjoro.***
***- Ĉu estis bele?***
***- Jes.***
***- Ĉu la pastro predikis?***
***- Jes.***
***- Ĉu vere? Kaj pri kio?***
***- Pri pekado.***
***- Kaj kion li diris?***
***- Li kontraŭas.***

## Anonco en Gazeto

"Edziĝonta junulo serĉas kontakton kun sperta sinjoro, kiu konvinku lin ne fari tion."

## Diri la Veron

Maljunulo sentas sin mortonta kaj vokas sian multe pli junan kaj viglan edzinon al si:
***- Nun mi baldaŭ mortos... diru al mi sincere, ĉu miaj infanoj vere estas miaj...***
***- Sed...*** hezitas la edzino.
***- Kaj se montriĝos, ke vi ne estas mortonta?***

## Spertulo Pri Pentraĵoj

Turisto vizitis ekspozicion de pentraĵoj kaj parolis al lia amiko:
***- Tiu ĉi pentraĵo estas vere realisma. Ĝi vekas mian apetiton.***
La konulo tiel demandis:
***- Kiel eblas, ke sunsubiro vekas vian apetiton?***
La turisto respondis:
***- Ĉu tio estas sunsubiro? Mi pensis, ke estis fritita ovo!***

## Sperta Pentristo

En pentraĵa ekspozicio en Parizo, la vizitanto demandis la pentriston kiu staris apud li:
***-Kion prezentas tiun ĉi bildon?***
***-Bovinojn sur paŝtejo.***
***-Ho jes! Sed paŝtejon tie mi ne vidas,*** respondis la vizitanto.
La pentristo tiel klarigis:
***-Tiun la bovino jam formanĝis.***
***-Sed, majstro, tie mi ne vidas eĉ unu bovinon!***
***-Mi demandas vin*** - diris la pentristo - ***kial restu tie la bovoj, se tie jam ne estas herboj?***

***- Ĉu vi trinkos bieron?***
***- Kial ne?***
***- Nu, ne do ne.***

***- Fiŝo?***
***- Fiŝo.***
***- Viva?***
***- Viva.***
***- Sed kial kun fermitaj okuloj?***
***- Dormas.***
***- Kaj kial ĝi malbone odoras?***
***- Aŭdu min, kiam vi dormas - ĉu respondecas pri vi? ?***

# ANEKDOTA VIVO

Unu viro staras antaŭ ponto. Sur ĝi estas afiŝo:
**"La ponto disfalas se du homoj pasas laŭ ĝi."**
La viro pasis kaj ĝi disfalis. Kial? Ĉar unu homo informita valoras du homojn!

Venis studento al manĝejo, sed ĉiuj tabloj estas okupitaj. Li sidas al profesoro, kaj tiu diras: ***"Ansero ne estas amiko de porko".*** - La studento: ***"Nu bone, mi flugos"***. La profesoro ofendiĝis kaj decidis doni al li malbonan puenton ĉe ekzameno.

Tago de la ekzameno. La profesoro donas al la studento la plej malfacilan bileton, sed li perfekte respondas. La profesoro demandas lin pri aldona demando: ***"Vi iras laŭ vojo kaj vidas 2 sakojn, unu estas kun oro, la dua estas kun saĝeco. Kiun vi elektos?" - "Kun oro".*** La profesoro: ***"Sed mi prenus tiun kun saĝeco". - "Nu, por kiu kio mankas..."*** La profesoro ofendiĝis kaj skribas en la ekzamenlibreto **"Kapro"**, studento ne ekrigardis kaj foriris. Post iu tempo li revenas kaj diras: ***"Profesoro, vi subskribis ĉi tie, sed ne skibis la puenton!"***

Oni forskribis studenton el la tria kurso de Fizikomatematika universitato. Nu kion fari, li envenis al klerika seminario. Kaj jen foje dum lekcio li ekdormetis laŭ la kutimo, sed dum la tempo al li venas kleriko kaj malrapide diras: ***"Nu filo mia, diru kio estas la dia forto"***. La studento senpensante rapide respondas: ***"LA DIA FORTO ESTAS LA DIA MASO, MULTIPLIKITA PER LA DIA AKCELO!!!"***

Etero ĉe la Rusa Radio. Anoncistino:
***- Pririgardo de gazetaro. En la studio estas Marija Makejeva.***
Marija Makejeva:
***- Bonan tagon. Hodiaŭ ĉe la centrala placo konfliktis bando de mazokistoj kaj taĉmento de milicistoj... Antaŭ tre longe jam neniu el ili ne ricevis tian ĝuon...***



# LA ATEISTO

( fabelo parto 1)

Rachel de Queiroz

**Jam antaŭ tre longe estis unu viro,** kiu estis ateisto. En la malgranda vilaĝo, kie li loĝis, ekzistis neniu alia ateisto krom li, tiel ke la kompatindulo vivis en granda izoleco. Tamen li estis orgojla kaj nenian faris plendon, eĉ kiam li sentis sin pli soleca, por ekzemplo en la dimanĉoj, kiam la tuta popolo de la loko iris aŭskulti la meson, kaj li restis vaganta inter la arboj de la placo; aŭ ankaŭ en la antaŭtago de la Kristnasko, kiam la personoj okupiĝis pri la Kripo kaj la Koko-Meso. Ili levadis raketojn en la aeron, la sonoriloj sonadis, ĉiuj ĝojiĝis kaj noktomanĝis kune. Tamen la ateisto ĉiam fordankis la invitojn, kiujn oni faris al li: ne preĝinte, li ne kredis, ke li havas rajton partopreni la kunvespermanĝon, des pli ke, estante ateisto, li estis ankaŭ honesta; li enŝlosiĝis en la hejmon kaj restis kun la kandelo lumanta, legante unu el siaj libroj pri ateismo. Kaj, se unu el la personoj venantaj de malproksime miris la figuron de tiu soleca viro leganta ĉe la malvarmeto de la fenestro kaj demandis, kial li ne ĉeestas en la meso aŭ en la kunmanĝo, lokanoj klarigis jene:

***- Li ne povas, li kompatindulo. Li estas nia ateisto***.

Pri la cetero, la ateisto vivis same kiel ĉiuj aliaj. Li laboradis en sia ofico, plantadis brasikojn kaj origanojn en la korto, zorgis pri du perdrikhundoj kaj ĉe la noktiĝo partoprenis en rondo de samlokanoj, kiuj konversaciis sidante sur la ŝtupoj de la fontano.

Kaj kiam la interparolo tuŝis la temon pri religio, ĉiam estis iu, kiu rimarkigis:

***- Vi, kiu estas ateisto...***

Tamen alvenis unu jaro, en kiu nia ateisto, pro diversaj kialoj, ŝajne eksentis sin ankoraŭ pli soleca. Mi forgesis diri, ke li estis fraŭlo. Kvankam la vilaĝo havis ian fieron posedi tiun strangulon – **iun publikan ateiston** -, la fraŭlinoj ne sentis kuraĝon edziniĝi kun viro tiel stigmatizita kaj kiu, apenaŭ li formortos, iros nepre sendite al la infero.

Venis hunda pesto, kiu mortigis liajn du perdrikhundojn. Tio ŝajnis puno por pligrandigi la solulecon de la kompatinda ateisto. Kaj liaj libroj, tiel multe legitaj kaj relegitaj, jam rakontis al li nenion plian. Dum la tago la laboro helpadis lin pri kompanio, kaj vespere li kunestis kun la amikoj. Tamen en tiuj antikvaj tempoj la homoj estis tre religiemaj kaj grandan parton de la tempo ili pasigis en la katolika preĝejo: en la mateno estis la meso, en la vespero, la rozario, en la nokto, la naŭtaga devotado, kaj dum ia ajn festo, la procesioj. Kaj en tiuj grandnombraj horoj, en kiuj la tuta popolo enmetiĝis en la preĝejon, la ateisto eliris el la hejmo, sidiĝis en la ombro de la krucego, sentis la bonan odoron de la incenso brulanta en la fumiloj, kaj tiam sentis ian ekdeziron eniri, rigardi la orkoloron de la vestoj de la sanktuloj kaj la belan latinon de la pastro. Tamen li ĉiam sin detenis de tio; kion dirus la popolanoj, se ili vidus lin tie interne?

Aliajn okazojn pri envio li spertis en la tagoj de procesio, kiam liaj amikoj vestis religian mantelon el kolora silko kaj transportis la portilon, la stangojn de la paliumo aŭ la lumantajn vakskandelegingojn, sed li staris en stratangulo kun la manoj pendigitaj ekde la kubutoj, en sia malnova vestaĵo de la ĉiutago. Tiam li reiris al la laboro, kvankam estis festotago, sed neniu skandaliĝis pri tio, ĉar ĉiuj komprenadis lian situacion de ateisto, malgraŭ tio, ke ili bedaŭris pri lia malfeliĉa destino.

al la paĝo 11

# VIRTUALA VIVO







**Kumbhamela** estas la plej mumtnobra religia festo.
Ĉiujare partoprenas ĝin ĉ. 100 milionoj da homoj.




Kiumaniere (fek...!) ĝis
ĉi tiu tempo pasis tri tagoj ?

(Tago - tempo inter sunleviĝo kaj sunsubiro)




**Ĉefaj pekoj de tipa edzo**




Se vi sentas, ke kolmedaleto (kun sankta
Kristoforo) estas tamen tro malmulte...




**SANKTA MANĜO**
(La Lasta Vespermanĝo)

Moderna versio

el la paĝo 9

# LA ATEISTO

( fabelo parto 2)

Rachel de Queiroz

Sed ĝuste tiam, en la fino de tiu jaro, aperis iu junulino, kiu menciinde estis nevino de la pastro kaj kiu enamiĝis al la ateisto. Kiel tio komenciĝis, neniu scias, sed la amo estas tia: junulino pasas tra la strato, ekvidas viron, kiun ŝi vidadis la tutan vivon kaj subite ŝi sentas baton ene de la brusto kaj komencas ami tiun viron.

Unue li nur kortuŝiĝis antaŭ la rigardoj, kiujn ŝi direktis al li, tiel dolĉaj kaj amikemaj. Tamen, poste, rimarkante sin amata, li, kiun neniu antaŭe amis, komencis ankaŭ ami ŝin.

Tiam ĉiuj loĝantoj de la loko bedaŭris pri la geamantoj, sciante, ke ili povos ekpensi pri geedziĝo kaj ke la pastro ne transdonos tiun naivan ŝafinon en la manojn de iu memkonfesinta ateisto.

Tiel alvenis la Kristnasko. Estis aranĝita la Kripo kaj komenciĝis la pilgrimado de la vizitantoj, kiuj venis kisi la piedon de la Infano. Kaj tiam la amatino de la ateisto insistis, ke li akompanu ŝin en tiu deviga vizito. Li diris, ke ne kaj ke nur grandpene li konsentus eniri en la ĉambron kaj resti en angulo, dum ŝi faros siajn devotaĵojn. Tamen tion la junulino ne akceptis:

***- Kiom kostas unu kiso? Ĉu vi ne kisas min?***

Li ridetis:

***- Sed tamen vi estas homo, vi estas el karno kaj mi amas vin. La Infano, kiel vi nomas ĝin, estas pupo el ceramiko.***

La junulino argumentis, ke el ceramiko estas ankaŭ la taso, kiun li portas al la lipoj kaj kiu tute ne malutilas al li. Li tiam menciis sian memamon, cetere ĉar li estis la loka ateisto, la sola tie.

En tiu momento la junulino eksploris, dirante, ke se li havas pli da memamo, ol amo al ŝi, estas ĉio finita. La ateisto ektimis pri tiu minaco kaj tial donis sian konsenton, kvankam kontraŭvole. Li akompanis la triumfan junulinon, eniris en la vicon post ŝi kaj alfrontis onies miregajn rigardojn. Unuj post aliaj, la **devotuloj** haltis antaŭ la Kripo, fleksis la genuojn, eldiris preĝeton kaj kisis la piedon de la Infano. Nun venis la vico de la amatino, kiu, farinte sian riverencon kaj doninte la kison, turniĝis kaj ridetis al sia bona ateisto, celante animi lin.

Li disetendis la rigardon ĉirkaŭen kaj vidis en ĉiuj la saman mienon de ĝojo kaj espero. Do li decidiĝis: *li fleksis la malglatan genuon kaj klinis la kapon sur la piedetojn de la adorato.* Kaj jen li sentis sub la lipojn ne la malvarmon de la porcelano, sed la varmon de la karno, la moviĝon, la pulsadon de la karno. Li levis la okulojn teruriĝinte. Li rigardis la Infanon kaj vidis, ke Li ridetas radiante al li, kaj el Liaj okuloj eliĝis lumo, kian neniam okuloj el ceramiko havus.

Oni diras, ke la ateisto falis sur la plankon, kun la brakoj krucigitaj, plorante kaj adorante. Kaj tiam en tiu nokto de Kristnasko ĉesis ekzisti la sola ateisto en la vilaĝo.

**Sed oni diras ankaŭ, ke li ne edziĝis al la amatino. Li ne povis tion, ĉar li forlasis ĉion kaj fariĝis monaĥo.**

Ĉi tiun naivan fabeleton verkis brazila fabel-verkistino Rachel de Queiroz (1910 —2003)



Rembrandt Harmenszoon van Rijn - Nokta gardistaro

# KACIKO KAJ JUĜO

parto I

Janusz Korwin-Mikke

**En malgrandaj primitivaj triboj regas kaciko** aŭ alia estro. Kiam la tribo fariĝas multnombra - kaciko ne povas mem decidi pri ĉiu afero – do li eldonas ĝeneralajn regulojn por normigi kondutadon. Ju pli multnombra la tribo – des pli malgrandan parton de decidoj povas persone preni sur sin la kaciko.

Ĝis certa tempo la kaciko decidis mem. Plej parte li estis reganto aŭtoritata, sed tutcerte la totalitara. Nun aperas la Leĝo – la aparta regpovo.

Kiel estis prezentinta tion la plej fama historiografo s.m. Aleksandro de Tocqueville: ***,,Regado de Leĝo estas pli aristokrata ol la ariostokratio. Anstataŭ obei al iu aristokrato, oni devas obei al la antaŭulo ties aristokrato".***

Kacikoj komencas rimarki, ke multe pli oportune estas sin bazi sur ia regulo ol mem eldonadi decidojn, rezulte kies iu povus ja esti malkontenta. Kaj la regatoj ankaŭ estas kontentaj – ĉar ili ne dependas de la kacikaj kapricoj, <u>ili scias, kio al ili estas permesite – kaj kio estas mapermesite.</u>

Tiuj avantaĝoj de la Leĝo estas videblaj eĉ en monarkio absoluta klereca. S.m. Frederiko la Granda estis ravita, kiam la simpla muelisto ne estis timigita de liaj minacoj kaj anoncis apelacii al juĝistoj en Berlino. Tia Leĝo estas bonega skeleto por la ŝtato.

Por ke la Leĝa Sistemo povu agi, la reguloj devas esti klaraj, simplaj kaj kompreneblaj – eĉ por la homo kun la inteligenteco malpli alta ol ties mezuma. Krom tio la Leĝoj devas esti malnovaj. Se mi malgajnas juĝproceson kun Kovalski surbaze de la regulo eldonita antaŭ la semajno, mi ĉiam estos suspektanta, ke Kovalski subaĉetis tiun, kiu estis eldonanta la regulon. Tia Leĝo ĉiam estos suspektata pri neobjektiveco – kaj ĝenerale ne senbaze. Ĝuste pro tio oni devas apogi sin je la leĝo malnova. Se mia konflikto kun Kovalski estas solvita surbaaze de la leĝo devenanta de antaŭ cent jaroj – tiam mankas la suspektoj.

**PRAKTIKA ATENTIGO**: la postulo minimuma, enhavita cetere en la Programo de Liberuloj estas, ke la nova regulo eniru la vivon ne pli frue ol ses jarojn ekde ĝia rezolucio. Kial ĝuste la ses? Almenaŭ pro du kaŭzoj.

**Unue**: ĝi estas la meza periodo de investada restituo; se mi investos en fabrikon, kaj la leĝdonanto intencos malfaciligi al mi la vivon – tiam mi almenaŭ retratos.


**Due**: ĝi estas la periodo pli longa ol la parlamentaj kadencoj. Per tio la regulo rezoluciita hodiaŭ eniros la vivon en la periodo, en kiu regos iu alia. Tio eleminas la volon krei la malleĝon - do la ,,**Leĝon**" ne plenumantan la kondiĉojn por la ordigita , stabila Leĝo.

**Mi ripetas**: laŭ la vidpunkto de la regato aŭ civitano estas indiferente, kiu ĉi tiun regulon eldonis: la Parlamento, Reĝo aŭ alia regpovo. Gravas nur, ke la regato anticipe sciu, kion pri tio povas lin atendi. Anstataŭ tio estas nenia diferenco inter la situacio, en kiu kaciko tute sen la motivigo eldonas dekreton, kiu forprenas al iu ekz. la havaĵon – kaj la situacio, en kiu la kaciko unu tagon pli frue eldonis, kaj pli ĝuste establis la ,,Malleĝon" pri forpreno de havaĵoj.

FINO DE LA EKSTERTEMAĴO

al la paĝo 15

# LINGVO







Entrada a sant Jeroni de la Murtra

# KACIKO KAJ JUĜO parto 2

el la paĝo 13

Janusz Korwin-Mikke

Kun la tempopaso, kiam la vivo komplikiĝis, la kvanto de reguloj komencis multiĝi. La plej bona ekzemplo estas la historio de la Leĝo juda. Ekde la du tabuloj kun Dekalogo ĝis Torao, poste ĝis Miŝnao, kaj sekve ĝis Gemarao.

Mi citas (laŭ Wikpedio): ,, ***La preciza respektado de multaj moseaj ordonoj enskribitaj en Torao ne estis teknike plenumeblaj post la detruo de Jerusalema Sanktejo. Kaj pro tio rabenoj devis fiksi por ĉiuj judoj la devigajn vivprincipojn en la kondiĉoj de ekzilo*** (…).

Miŝnao estas dosiero komence de buŝaj, kaj sekve leteraj respondoj fare de rabenoj al la kredantoj, kiuj starigadis, kiel praktike interpreti la determinitajn enskribojn, kiujn enhavas la Torao. Post la ordigo de tiu tradicio kreiĝis la leĝarigo enhavanta la tutan agosferon de la moroj (festoj, ceremonioj, ritoj, rajtoj, moroj ktp.) – sume ĝi enhavas 248 bazajn devigojn kaj 365 malpermesojn, sistemigitajn laŭ ordo, kiu estas en la biblia Librego de la Ripetita Leĝo.

Anstataŭ tio la Gemarao formas tre abundan komentarion al la unuopaj fragmentoj de Miŝnao, ankoraŭ pli precize determinantaj la ĝustan konduton de la pia judo en konvena situacio (…).

En la eldono de Bromberg (Venecio 1520-1523) la volumo "***de la Talmudo (la Miŝnao + Gemarao) Jerusalema sumiĝis je 526 folioj en tridek sep volumenoj".***

En tiu momento aperas juĝisto – ĝuste interpretanta la Leĝon. Kaj tio kreas la tute novan situacion…


En la momento de apero de juĝisto kreiĝas la nova speco de regpovo. La juĝisto do devas interpreti la Leĝon tiamaniere, ke ĝi estu konvena kun la volo de kaciko aŭ alia monarko – en kio konsistas ties rolo…

La ununura persono, kiu povas kontroli, estas monarko mem - kaj kutime li plenumas tiun funkcion, persone verdiktante en la precedencaj juĝaj kazoj. Ĉar la juĝisto devas nur samsenti la intencojn de la leĝdonanto, do oni povis sentime meti sian fidon sur lin – kaj samtempe fari lin sendependa de iuj ajn oficistoj. Oni devis tion fari nepre: ia ajn enmiksiĝo de oficisto en la decidoj de juĝisto rompus la rajtojn de la monarko mem – en kies nomo tiu juĝisto ja verdiktas.

Tiamaniere – tutcerte malgraŭ malkontento de oficistoj – formiĝis la juĝista sendependeco.

Samtempe kun la disvastiĝo de ŝtatoj, monarkoj trosarĝitaj de devoj, transdonadis tiujn al diversaj anstataŭantoj. Ĉi tiuj akiris grandegan povon - kaj ofte utiligadis ĝin, por senigi la monarkon prerogativojn. Tiel estis kun majordomoj en Eŭropo, ŝogunoj en Japanio – kaj en la plej novaj tempoj kun 1-aj sekretarioj en la komunismaj landoj. Por sekuriĝi antaŭ tio monarkoj aplikis la principon: ***"Dividu kaj regu"***-kutime partigante la regpovon laŭ maniero logika kaj natura je Leĝdonantaro kaj Ekzekutivo. Reĝo tiumaniere regis la situacion: li persone nomumis ĉefministron – la ĉefon de Ekzekutivo reganta en la nomo de la monarko – kaj la kronkonsilantaron, kiun kutime li mem prezidis kaj mem subskribadis la leĝojn – ĉiam edonitajn en lia nomo.

**Tiumaniere fariĝis tiu FAMA tripartiga regpovo.**




# SENVORTA VIVO









# ANEKDOTOJ DE IJS

**Lasta eldiro de mortintoj:**

- Kio?! Kion mi ne aŭdacas?!
- Lasu la eskalon, mi subeniras eĉ sen tiu...
- Se vi volas ankoraŭ vinon, mem iru al la kelo...
- Kion vi volas kun tiu hakilo...
- Mia filino meritis ne tiom aĉan homon kiel vi...
- Pasaĝero: de dekstro bone...
- Astronaŭto: Ne, ne, mi ankoraŭ havas aeron por duonhoro...
- Bombeksperto: Kuraĝe nur tondu tiun kablon...
- Kemiisto: Tiu ĉi estas la gustuma provo...
- Autostir-instruisto: Kaj nun provu ankaŭ vi...
- Elektristo: Memkompreneble mi malŝaltis la kurenton...
- Tur-saltisto: Kie estas la akvo?!
- Ostaĝo: Vi certe ne pafos...
- Hundeto, venu al la oĉjo...
- Haha, ŝajnas ke nur mi restis viva...
- Kamaradoj, ne pafu, mi tamen restas...
- Ĉu ne via edzo venis hejmen, karulino?
- Se ankoraŭ unu fojon rigidiĝas la komputilo, mi mortigas min...
- Ĉu cigaredon?

**Raras kiel:**

la vizito de gepatroj en orfejo

**Tamen ne:**

la kulino estu la sangodonanto
la marmelado konservu la avinon
la barilo tiru la fervojiston
la vosto svingu la hundon

**Atentu homo ĉar:**

mi batas kiel industria kurento
eĉ mia preterbato estas mortiga
vi ludas kun via vivo, kaj vi estas ĉe malvenko.

**- Mia edzino forlasis min kun mia plej bona** amiko, Jozefo.
- Jozefo neniam estis via amiko...
- Nun jam jes...

**- Mia patro estas masonisto, kaj faras loĝejojn..**.
- Mia patro estas verkisto, kaj faras fabelojn...
- Kion faras via patro?
- Tion, kion diras mia patrino...

**Kuracisto al malsanulo:**

- Bonvolu pisi en la ujon, tie sur la breto, ĉar mi devas foriri telefoni, kaj revenas nur post 10-15 minutoj.
Kiam li revenas, la tuta ekzamenejo gutas de piso.
- Kion vi faris, aĉulo?
- Ĉu vi scias kiom malfacile estis celi al tiu ujo?...


**Kio strangas sur avinjo?**


- Aĉjo.

Unu orelon eniras, alian eliras, kaj tamen restas en via kapo, kio estas tio?
- Pioĉo.


- Panjo, kial kuras paĉjo tiom zigzage?
- Ne zorgu pri tio, nur donadu la kartoĉojn. .

# SENVORTA VIVO
















kontinuo el pli fruaj numeroj

# BUKAJ-AJ ESPERANTISTAJ FRENEZETULOJ

de Barry Friedman

Glito vizitus Rudiakanison dum sia libera tempo. La domo de Rudiakaniso ĉiam estis je stato de kompleta malpureco kaj malordo. Estis libroj, revuoj, ĵurnaloj, dokumentoj, manĝaĵ-kovriloj, kaj ladskatoloj ĉie sur la planko kaj sur la sofoj kaj la seĝoj. Malordo regis komplete. Glito ofte sugestis al Rudiakaniso, ke li dungu servistinon aŭ eĉ edziĝu kun meksika virino por ke ŝi purigu la domon. Rudiakaniso forridis tiujn sugestojn, dirante ke li estas tro maljuna kaj tro rigida por edzeco aŭ dungi hejmhelpistinon. En sia libera tempo, nuntempe preskaŭ ĉiam en izoliteco, Rudiakaniso tradukis malnovajn rusajn poemojn de Puŝkino aŭ Lermontovo en la anglan. Li legis germanajn romanojn verkitaj de Tomaso Manno kaj Hermano Hesseo kaj Goetheo kaj perdus sin en mondo de fantazio. Unu tagon li subite ekparolis al Glito per sia latva/rusa/germana akcento:

***"Vi scias, sen miaj tradukoj kaj miaj romanoj, mi verŝajne pafus min! Ĉiaokaze, ĉu vi volas kekseton?"***

Glito estis koncernata.

***"Kial vi pasigas tiom da tempo sola? Kaj kial tiuj tradukoj estas tiom gravaj por vi? Kiu vere pripensas pri Lermontovo? "***

***"Nu, mi havas grupojn al kiuj mi vizitadas foje."***

***"Kiajn grupojn?"***

***"Lingvajn grupojn. Estas la franc-lingva klubo, la hispan-lingva klubo, kaj la Esperanto-klubo".***

***"Ĉu Esperanto? Kio estas Esperanto?"***

Glito estis ja konfuzata de tiu vorto.

***"Ĝi estas lingvo elpensita de viro en Pollando en 1889. Li esperis ke tiu lingvo fariĝus universala kaj homoj en la tuta mondo do povus paroli unu la alian."***

***"Kial vi vizitadas ĉiujn tiujn klubojn?"***

***"Ĉefe renkonti knabinojn. Je mia aĝo mi ne povas renkonti ilin alimaniere, kaj mi ankoraŭ povas paroli al belaj junaj virinoj kaj eble havas la fantazion, ke ili volus havi rilatojn kun mi. Eble ili ne scias, ke mankas al mi la povo havi erektiĝon plue."***

***"Ĉiam estas viagro."***

***"Ho, ne, mi aŭdis rakontojn pri tio, ke ĝi igos, ke oni daŭras tro longe, ekzemple kvin horojn. Tion mi ne volas! Sed venu, venu kun mi hodiaŭ al la Esperanto-klubo. Mi kredas ke vi ĝuos ĝin. "***

***"Nu, bone. Kial ne? Mi ne perdos ion se mi iros tie kun vi.”***

Je tiuj vortoj la mezaĝa, eksvojaĝema viro kun nov-akirita intelekta scivolemo kaj la maljuna Latvo kun emo por flirtado kun konfuzitaj junaj virinoj suriris la hidrargokoloran Saturnon de Glito. Tiu mezgranda aŭto, kiu estis fabrikita en 1999 dum la prosperaj jaroj de la registaro de Klintono, estis brila kaj stilema kaj indikas usonan riĉecon kaj lukson kaj la neceson montri al la resto de la mondo, ke Usono estas la numero-unu-a superpotenco. Ĝi triumfas super ajna alia lando, kiu provas efektivigi Unua-Mondan statuson el la ŝlimo kaj ŝimo de siaj mizeraj estintecoj.

iru al la paĝo 21

**ENIGMA VIVO**

# FREŜA MAGIA KVADRATO

nur por tiuj, kiuj ŝatas pensi ! aliaj - lasu ĝin

1. izolil' en elektraj aparatoj.......
2. ŝpinili, konukli .......................
3. aĵ' ..........................................
4. ne povanta esti .....................
5. em', instinkt', tendenc' ..........
6. giganto el greka mitilogio .......

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | |
| 2 | | | | | | |
| 3 | | | | | | |
| 4 | | | | | | |
| 5 | | | | | | |
| 6 | | | | | | |



**Kiumaniere solvi krucvortenigmon ?**

Unue oni devas iomete pripensi !
Por ke solvado estu pli klara - enskribu majuskle literojn! Per sageto eniru kvadrateton kaj musklaku ĝin (per maldekstra puŝbutono).
Enskribu ĝustan literon de la vorto kaj iru al sekva kvadrateto. Enskribu sekvan literon kaj iru ... ktp, ktp.
Por kontroli ĝustecon de magia kvadrato - iru al la lasta paĝo... SED...
Unue vi devas iomete pripensi...



kontinuo el pli fruaj numeroj

# BUKAJ-AJ ESPERANTISTAJ FRENEZETULOJ

de Barry Friedman

Glito kaj Rudiakaniso veturigis sur Indianola Avenuo kie homoj skuis siajn kapojn draste tien kaj reen je la sono el muĝoskatoloj kiuj estis bruegantaj la plej bonan hip-hop-an muzikon de la lastaj dudek jaroj. Glito drame manovris la aŭton en perfortan kunfandon de Aŭtovojo I-71 kaj Indianola Avenuo. Tiu itinero kondukis al la urbocentro kaj la ĉefa biblioteko, vasta kaj tre ampleksa biblioteko kiu estis voĉdonita esti unu de la plej bonaj en Usono de Tajm kaj Neŭsŭik gazetoj. La Esperanto-kunveno estis okazonta en la kvina etaĝo de tiu amasa, titania komplekso. Ĝi situis apud Jeferson Strato kaj Grant Avenuo en kruda parto de la urbocentro sur la orienta flanko de Haj Strato. Oni devas esti zorgema piedirante el la aŭto por iri al la biblioteka enirejo. Bonŝance Glito kaj Rudiakaniso povis parki sube en la subtera garaĝo, kie parkspacoj estis malabundaj kaj kie la biletaj servistoj ĝenerale estis amikemaj afrikaj viroj kiuj ridis je la stultajn ŝercojn, kiujn homoj diris tiam, kiam ili pagis la du-dolaran parkkotizon.

***"Ho, tio estas komika, jes ja!"***

Ĉi tio donis al homoj senton de komforto en mondo, kiu povas esti fojfoje malvarma kaj timiga. Rudiakaniso piediris malrapide, uzante bastonon, de la garaĝo en la bibliotekon, kie eklektika kafejo en la vestibla areo estis disponebla servi ilin bongustajn dolĉaĵojn. Rudiakaniso aĉetis ĉokoladokreman nubetpufaĵojn kaj Glito aĉetis salamsandviĉon kaj skatolon de Sinjoro Pibbo, kiu estis malofta plezuro en Ohio. La du viroj sidis sur ferarĝentaj seĝoj, apud baraktanta, socia-dependa familio, kiu estas argumentinta pri fakturoj kaj socialaj asignaĵoj kaj sanproblemoj.

Subite 40-kaj-kelkaj-jara viro kun malrektliniigitaj dentoj, seboŝmirita hararo, hida akneo, pala vizaĝhaŭto, kaj granda biciklokasko sur la kapo alproksimigis Gliton kaj Rudiakanison. Tiu viro havis superenergian mienon; ŝajnis ke li ĵus konsumis pli ol 50 tasojn da kafo unuglutege. Li estis maltrankvile spiritema kaj havis la energion de maljuna infano en la korpo de mezaĝa viro. Ŝajnis ke la infana animo neniam eliris el li. Li komencis paroli laŭte kaj ĥaose al la du viroj.

***"Hej, pardonu, pardonu, mi estas malfrua ĉar mia busvetura permesilo perdiĝis ĉar vi scias kiel la vivo estas tiam, kiam oni foje simple ne povas trovi busveturan permesilon en la rubejo ĉar rubo amasiĝas en la domo tiam, kiam ne ekzistas homo, kiu purigas la rubejon kaj ĝi simple amasiĝas ĉar aĵoj ĉiam amasiĝas kaj konstruas sin ĉar la mondo funkcias tiel sed mi estas studinta la rusan kaj mi kredas ke mi majstris la rusan kaj mi nun estas flua en la rusa post nur kvin tagoj, nur kvin tagoj, kaj mi scias ĉiujn rusajn vortojn kaj frazojn en la libro, se libro eĉ ekzistas, ha ha ha! Tio estas tiel amuza, ĉar estas neniu libro, neniu rusa libro, Hahaha! Ĉu vi komprenas tiun ŝercon?!"***

Glito kaj Rudiakaniso estis iom perturbitaj. Glito estis ankaŭ hororita. Rudiakaniso decidis klarigi.

***"Glito, tiu estas Davido. Li estas ano de nia Esperanto-grupo."***

Glito flustris diskrete en la orelon de Rudiakaniso:

***"Ĉu ĉi tiu ulo estas ano de nia grupo? Ĉu li ĵus eliris el psikiatra malsanulejo?"***

Rudiakaniso ne komprenis:

***"Kion?!" "***

**Daŭrigota**










# BESTARA VIVO









# J U D A  V I V O

**Enkonduko al la anekdotoj:**
Judaj religiaj studoj (Talmudo) postulas altan intelektan nivelon por kompreni la pensmanieron de la egzegistoj (interpretistoj) de la Biblio. Tiu pensmaniero nomiĝas hebree Pilpul ("piprumado": akra interdiskutado ). Ĝi estas speco de intelekta gimnastiko de la cerbo, konsistanta el teoriaj analizoj de hipotezaj situacioj. Homo, kiu sukcesas disvolvi tiun pensmanieron, povas tre facile krei humuraĵojn, ĉar en plejmulto de la ŝercoj oni trovas teoriajn analizojn de hipotezaj situacioj.



Okazis entombigo de fama riĉulo. La ĉareton, kiu portis la mortinton, sekvis plorantaj parencoj kaj geamikoj.
Alvenis fremda homo kaj aliĝis al la grupanoj, same ploranta.
Demandis lin unu de la proksimuloj: "Kial vi ploras? Vi ja ne estas parenco de la mortinto."
Resopondis la ulo: "Ĝuste pro tio mi ploras..."

Fiera juda patrino sendis sian filon al la lernejo unuafoje.
"Estu bona knabo, mia BUBALE *(ĝenerala karesnomo por infanoj, en la jida lingvo)!*", ŝi diras. "Gardu vin kaj pensu pri Panjo, ***mia dolĉaĵo***! Panjo amegas vin, ***mia sukeraĵo***! Venu poste hejmen rekte per la buso, ***mia mielo***."
Posttagmeze ŝi atendas la buson kiu revenigas sian filon. Vidante lin ŝi demandas: "Kion ***mia amo*** llernis en la unua tago?"
Respondis la knabo: "Mi lernis ke mia nomo estas David."

**Ĉu vi kuiras ĉine?**
Ajzik Kohen (Isac Cohen) manĝis en ĉina restoracio (same kiel ĉiu "bona" judo en Usono...) kaj babiletis kun la kelnero Ŭong Ĉong (Wong Chong).
Kohen: "Vi, ĉinoj, estas konsiderataj kiel tre saĝa popolo."
Ŭong: "Tio veras. Ĝi estas pro tio, ke nia kulturo estas tre antikva: 4,000 jarojn. Sed ankaŭ vi, judoj, estas tre saĝaj. Ĉu mi pravas?"
Kohen: "Jes, ni estas saĝaj. Nia kulturo aĝas 4,500 jarojn."
Ŭong: "Tio tute ne eblas! Kie do vi manĝis dum 500 jaroj?"

**Juda patrino**
Poldevena juda patrino Roza sidas ĉe la frizistino en Tel-Avivo (sub la harsekigilo...).
Frizistino: "Nu, kiel fartas via filino?"
Roza: "Sufiĉe bone, dank` al Dio. Ŝi edziniĝis al bonega viro, bonstata. Li havas tre bonan postenon en granda firmao kaj pro tio ŝi rezignis pri la laboro de sekretariino. Ŝi povas do sidi hejme sed devas nek kuiri nek purigi la hejmon, ĉar la edzo zorgis pri tio, ke ŝi havu
kuiristinon kaj purigistinon. Li ankaŭ prizorgis por vartistino por la ĉarmaj 2 infanoj, do ŝi ne devas tro okupiĝi pri ili."
Frizistino: "Bonege. Kaj kiel fartas via filo?"
Roza: "Ho, li estis malbonŝanca kaj lia vivo estas malsukcesa. Li edziĝis al terura virino. Ŝi neniam kuiras kaj pro tio li devis dungi kuiristinon. Ĉar ŝi ne volas purigi la tapiŝojn kaj la polvon, li devis akiri purigiston. Li devas labori kiel azeno ĉar ŝi ne trovis laborolokon. Krome, pro tio ke ŝi neglektas mian nepon, li estis devigita dungi vartistinon."

**Helpe de Dio**
Juda junulino (de ortodoksa familio) venigas unuafoje sian fianĉon Abrahamo al la gepatroj por vespermanĝo. Post la manĝo la patrino petas de la patro prezenti al la fianĉo diversajn enketajn demandojn.
La patro sidiĝas aparte kun Abrahamo kaj komencas "enketi":
Patro: "Kiuj estas viaj vivoplanoj?"
Abrahamo: "Mi studas en Jeŝivo." ("Jeŝiva": multjara juda seminaro por studi la religiajn skribaĵojn kaj ankaŭ por fariĝi rabeno).
Patro: "Tre bele, sed kiamaniere vi prizorgos materie mian filinon, kiu kutimas je sufiĉe alta vivnivelo?"
Abrahamo: "Mi studos kaj Dio zorgos por ŝi."
Patro: "Kaj kiamaniere vi povos aĉeti por ŝi belan geedziĝan ringon, kiun ŝi ja meritas?"
Abrahamo: "Mi koncentriĝos je la studado kaj Dio prizorgos tion."
Patro: "Kaj kiu prizorgos la estontajn infanojn?"
Abrahamo: "Ne zorgu, sinjoro. Dio prizorgos ankaŭ ilin."
Pludaŭris la interparolo, tiel ke je ĉiu demando de la patro la junulo respondis per la sama frazo: "Dio prizorgos tion".
Post kiam la fianĉo iris hejmen, la patrino demandis la edzon: "Nu, kion vi parolis kun li?"
Respondis la patro: Li ne havas laboron; li ne havas planojn; sed la bona afero estas, ke li pensas ke mi estas Dio."

Ĉiuj anekdotoj arigis
Josefo Shemer - Israelo




**Paĝo 3**
Mazda
Skoda
Volkswagen
Suzuki

**Paĝo 5**
Mitsubishi
Peugeot
Renault
Lexus

**Paĝo 7**
Daewoo
Audi
Toyota
Infiniti

**Paĝo 9**
Citroen
Mercedes
Bentley
Subaro

**Paĝo 11**
Mustang
Dodge
Vauxhall
Tata

**Paĝo 13**
Daihatsu
Mini Cooper
Lamborgini
Ferrari

**Paĝo 15**
Chrysler
Buick
Cadillac
Chevrolet

**Paĝo 17**
Jaguar
Gucci
Maybach
Honda

**Paĝo 19**
Rolls Royce
Ford Mustang
Lada
Kamaz

**Paĝo 21**
Scania
Volvo
Ford
Daihatsu